



*Esperanto
en Danio*

19-a jarkolekto • n-ro 3 • aŭgusto 2012

ESPERANTO

125

1887-2012

Esperanto en Danio

membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

Adreso de la asocio/prezidanto:

Ileana Schrøder

Vestavej 4, 2770 Kastrup

☎ 32 51 31 16 dea@esperanto.dk

Ĝirokonto: 1551-805 7370

UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:

Arne Casper Mortensen (kasisto)

Finn Østerbæk (vicprezidanto)

Jens S. Larsen (sekretario)

Bent Jensenius

Peter Wraae

Redakcia adreso:

Jens S. Larsen

c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77

2770 Kastrup

☎ 52 64 44 72 eed@esperanto.dk

Presado:

DDFO

Adresŝanĝoj al:

La prezidantino (adreso supre)

Represo de artikoloj el EeD estas permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

01.10.2012

Enhavo

La defioj de la Jubilea jaro pludaŭras3
Protokolo de la Ĝenerala Kunveno....4
La jarkunveno en Berlino.....6

Bodil Kühlmann forpasis.....7
Kopenhago.....9
Paperaj gazeteltondaĵoj.....12
Næstved.....13

Tutmondaj ekzamenoj.....14
Esperanta lu-biciklo.....14
Android denove.....15
Trinkejo Esperanto en Aarhus.....16
Afiŝoj.....16

Premio Cigno 201217
Arto kaj komunikado.....17
Kongreso de EEU.....20
UEA ĉe UN pri indiĝenoj.....21
Feliĉan Naskiĝtagon!.....23

La defioj de la Jubilea jaro pludaŭras



En la lasta numero de nia revuo mi skribis pri la propono de Eŭropa Esperanto-Unio pri kantado de la Eŭropa Himno en Esperanto. Bedaŭrinde la Eŭropa Komisiono ne akceptis registri la popoliniciaton de EEU. La respondo estis, ke ili taksas sin nekompetentaj, ĉar neniu membroŝtato agnoskis Esperanton kiel parton de sia kultura heredaĵo, kaj oni ne povas konsideri

Esperanton parto de la komuna kultura heredaĵo. La estraro de EEU konsideras apelacii al la Ombudsmano, do la iniciato ne estas definitive forlasita.

Aliaj pli pozitivaj iniciatoj sukcesis, kiel la Tutmonda KER-ekzamensesio la 9a de junio, kadre de kiu en 17 landoj ekzameniĝis 356 personoj, 8 el kiuj sukcese trapasis ĝin en Kopenhago. La gazetara kampanjo antaŭ la 26a de julio estis intensa tra la mondo, kaj estis interese sekvi ĝin en la reto. La defioj ne finis la 26a de julio kaj niaj defioj esti videblaj daŭrigas:

- la 4-an de aŭgusto je la 17-a horo Espo Despo muzikos dum la Kulturaj haventagoj (Kulturhavn) en Islands Brygge Kulturdomo
- la 1-an kaj 2-an de septembro ni estos videblaj dum la foiro aranĝita de la Komunumo de Kopenhago
- la 26-an de septembro, en la tago de Paco, ni kunaranĝas kunvenon en la Biblioteko de la Kulturdomo.
- La 9-an–11-an de novembro ni partoprenos en la Librofoiro (Bogmesse) en Bella Centro.

Do, ne mankas la defioj, eble nur la fortoj por fari des pli da aranĝoj.

Protokolo de la Ĝenerala Kunveno

de Dana Esperanto-Asocio

Dimanĉe la 27-an de majo 2012 je 10:00h en Berlino

- 1 **Elekto de gvidanto:** Ina Schultz, kiu deklaris, ke la kunveno estas laŭstatute kunvokita. Laŭ la peto de Ina la laborlingvo de la kunveno estis la dana.
- 2 **Elekto de protokolanto:** Betty Chatterjee.
- 3 **La raporto de la jaro 2011:** La prezidantino, Ileana Schrøder, prezentis la enhavon de la jara raporto, kiu legeblas en 'Esperanto en Danio 2012/2. Ŝi principe akcentis la kunlaboron kun aliaj asocioj, nelaste la UN-asocio. Dum la jaro DEA aliĝis al KUKS. La lasta statutŝanĝo estis helpa en tio. – La revuo Esperanto en Danio estas tre multekosta pro la sendado kaj la nekresko de la membraro. – La dana individua membraro de UEA kulminis ĉe 108 pro la rabato al UK. – Problemo al DEA estas ke ĝi dependas preskaŭ ekskluzive de la kotizoj. Ni preparolis la ideon, ke pro la ekonomiaj problemoj de la asocio ni varbu subtenantajn membrojn, kies pli malaltaj kotizoj povus plibonigi niajn financojn. – Estas malfacile reteni gejunulojn, ĉar ili ofte translokiĝas ekster la landon kaj praktikante Esperanton perrete ili ne vidas kaŭzon aliĝi al asocio. Malgraŭ tio, DEJO multe gajnas per laboro de siaj membroj en la Roskilde-festivalo kaj tiel povas subteni la bezonojn de DEA.
Oni akrame akceptis la raporton.
- 4 **La kalkulaĵo de la jaro 2011:** La negativa rezulto de la jaro estis kaŭzita de niaj elspezoj ligitaj al UK: la nacia vespero en Tivoli kaj la rubandoj super la promenstrato. La minuso estus multe pli granda sen subvencio de KEK kaj DEJO. Oni multe, sed sensukcese, klopodis por atingi subvencion de eksteraj fondusoj. – La kalkulaĵo estis akceptita.

5 Laborplano de D.E.A. 2012–2013:

5.1 Informado:

Partopreno en 4 foiroj en Kopenhago; Krop–Sind–Ånd, la libro-foiro en Bella Center, la Internacia Tago kaj la nova “Kultura Haveno” (ambaŭ en Kopenhago) kaj Foiro en Aalborg.

Organizado de prelegoj.

Daŭraj kontaktoj kun la komitato de UN-Asocio, oficialaj instancoj kaj NRO-oj.

Sendado de gazetaraj komunikoj pri la projekto 125.

Daŭre aktualigi nian hejmpaĝon.

5.2 Instruado:

Kunlaboro kun ILEI sekcio por plifortigi la lingvan nivelon de la membraro pere de kursoj kun eksterlandaj gastoj.

La apogo de KER-ekzamenoj la 9-an de junio 2012. DEA subvenciis la 8 ekzamentojn per la pago de duono de la kotizoj. Tio estas parto de la agado okaze de la 125-jara datreveno de la lingvo Esperanto.

5.3 Utiligado:

Subteni la utiligon de Esperanto fare de niaj lokaj kluboj.

Aranĝi Grundtvig projekton kune kun aliaj partneroj.

Solene festi la jubileon 125.

– Cetere ni daŭre restos en la kulturdomo. Novaj najbaroj estos la muzika asocio Tingluti. Ni pripensadu novajn kontaktojn kun aliaj partneroj. Eble ekos nova agado en junio pri kampanjo enkonduki Esperantan tekston por la Eŭropa himno; temas pri la kolekto da 1 miliono da subskriboj de eŭropaj civitanoj.

– La plano estis akceptita.

6 Proponoj. Neniaj proponoj estis prezentitaj.

7 Elekto de prezidanto. Ileana Schrøder estis re-elektita.

8 Elekto de 4 estraranoj: Michael Brandbjerg, Arne Caspersen (re-

elekto), Bent Jensenius (re-elekto) kaj Peter Wraae.

9 Elekto de 2 anstataŭantoj: Ejnar Hjorth kaj Stanislaw Mielczarek estis re-elektitaj.

10 Elekto de 2 revizoroj kaj anstataŭanto: Tara Gregers (re-elekto) kaj Sven Sandø estis elektitaj kiel revizoroj. La posteno de anstataŭanto ne estis okupita.

11 Jarkunveno 2013: la 13a – 14a de aprilo 2013 en Kopenhago.

12 Eventualaĵoj

Oni proponis, ke ĉiu membro klopodu trovi unu 'subtenantan membron'. – Nova reklamilo farita de Stano Marček baldaŭ aperos en la hejmpaĝo esperanto.dk.

13 membroj partoprenis la kunvenon.



La dana partoprenantoj en la Berlina komuna kongreso

La jarkunveno en Berlino

Pentekoste dum belega suna vetero okazis la komuna dana-germana-pola kongreso kie ni havis nian jarkunvenon. Estis nova sperto, alloga pro la fakto ke kunvenis pli da aliĝintoj ol ni kutime spertas dum niaj naciaj

jarkunvenoj, kaj pro la riĉa programo. La temo de la kongreso estis “Partneroj en Eŭropo”. Okazis diskuto pri la rolo de Esperanto en Eŭropa Unio kaj ekzemploj de eŭropuniaj projektoj subveciataj de EU.

La vespera programo estis abunda. Precipe la koruso de ĉarmaj polaj junulinoj kiuj kantis en Esperanto kaj pole ravis nin, sed ankaŭ la teatraĵo de Sasa Popovic kaj Georgo Handzlik pli kongresaj kutimoj amuzis nin. Same la trilanda vespero kun bardoj el tri landoj: Kimo, Stefo kaj Georgo. La belega vetero instigis nin uzi iom da tempo por trarigardi la urbon. Entute bela travivaĵo kun bona etoso, kiu restos agrabla en nia memoro.

Bodil Kühlmann forpasis



Bodil Kühlmann mortis la 14-an de julio, 2012 en flegejo en Brønshøj – en la aĝo de 91 jaroj.

La edzo, Gustav Kühlmann, mortis en 1999.

Bodil (Nielsen) naskiĝis en Fredericia. Junaĝe ŝi ofte estis inter la tieaj esperantistoj. S.K. Nielsen aranĝis kursojn kaj ekskursojn. Kune ili iris al la kursoj de L. Friis, kaj baldaŭ Bodil mem povis instrui al aliaj. Ŝi renkontis Gustav Kühlmann. Kune ili faris hejmon en Brønshøj. Ŝi aranĝis kursojn, ankaŭ aparte al la blinduloj. Dum jaroj la hejmo tenis la libroservon.

Tiam estis granda aktiveco inter la esperantistoj. En Kopenhago apud KEK troviĝis fervojista, laborista, blindula, kaj kleriga kluboj. Kühlmann estris KEK, kiu estis fondita en 1908 kaj estas sekcio de UEA. Por tiu klubo Gustav estis prezidanto dum 50 jaroj – kun kelkaj interrompoj – ĝis la jaro 1997, kiam la fortoj ne plu sufiĉis.

La paro bone kunlaboris. Kune ili havis filinon, Lizeta, kiu aŭtomate lernis Esperanton pro la aktivecoj en la hejmo, kie venadis eksterlandaj gastoj. Ŝi ĉeestis la infankongreson en 1956. – Kiam Lizeta unuafoje deziris kuniri al kongreso, ŝi unue devis finlerni la gramatikaĵojn dum kurso.

Ili faris multajn diversajn aranĝojn, iniciatis kunvenojn, interalie kun la aliaj kluboj. La Dan-Sveda Tago kunlabore kun la svedoj okazis ĉiujare ek

de 1946–1990. La unuan dimanĉon en septembro estis aranĝita ekskurso en Lund aŭ en Malmø, la sekvan jaron la kopenhaganoj aranĝis tion.

Bodil kaj Gustav vizitis multajn kongresojn. En 1948 ili respondecis pri la postkongreso por la UK en Malmö. En 1956 kaj en 1975 ili okazigis la Universalan Kongreson de UEA en Kopenhago.

“Fonden for ESPERANTO-DOMO”, fonduso fondita en 1943 estas prizorgata de grupeto, ĉefe KEK-membroj. Unu fojon jare pluraj kontribuas al la fonduso. En la jaro 1986 estis aĉetita loĝejo. Gustav dum monatoj laboris kaj laborigis metiistojn por pretigi la ejon. Tie ni klubkunvenis kaj la biblioteko estis aranĝita tie. DLEA la lastajn jarojn havis monatan kunvenon en la ejo. Okazis estraraj, komunkomitataj kaj aliaj laborkunvenoj tie.

Fidela membro, Ebba Geddey, heredigis grandan sumon al la fonduso.

En la jaro 1998 ni festis la 90-jariĝon de la klubo. Tiam Bodil kaj Gustav venis por festi kun ni.

1999 la estraro de KEK decidis vendi la loĝejon. Tio kompreneble doloris Gustav kaj sekve Bodil.

El la rakontoj kaj literaturo mi scias, ke ili havis bonan kontakton kun Margrethe Noll.

Roma kaj Poul Thorsen multe rolis en ilia vivo. Por la kunvenoj de la laboristoj estis la kutimaj kontaktoj Åge Benze kaj Else Margrethe Nielsen.

Por la blinduloj Bodil dum multaj jaroj voĉlegis el diversaj revuoj. Ŝi monate vizitis la Blindulan Instituton por la produktado de bonaj kompaktdiskoj al ĉ. 20 blinduloj en Danio.

Bodil redaktis la landan revuon DEB (Dansk Esperanto-Blad / Dana Esperanto-Bulteno) dum kelkaj jaroj ekde 1965. La laboro estis enormaj, oni apenaŭ havis komputilon kaj ne retkonekton. Kopiojn oni tajpis duoble aŭ stencilis kaj sendis perpoŝte.

Ni profitas de heredaĵoj. Gustav kun plezuro kolektis preskaŭ ĉion. Bodil kaj la filino penis daŭre gardi la aferojn. Kaj tio ne ĉiam estis tiom facila. Mankas Domo!

Jytte Sunekær

Kopenhago

La kunvenoj de KEK komenciĝas je la 19-a kaj finiĝas je la 21-a. La adreso estas: Tomsgårdsvej 35, 2400 København NV. Cetere la kluba programo legeblas ĉe la Facebook-grupo 'Amikoj de la Kopenhaga Esperantisto-klubo'. La kluba kontaktulo estas la prezidanto:

Betty Chatterjee +45 38 89 10 13 chatterjeebetty@hotmail.com

Aŭtuna Programo 2012

Lundon 13.08: Ni parolos pri la someraj travivaĵoj. Jytte Sunekær jam promesis, ke ŝi informos nin pri la Universala Kongreso en Hanojo.

Lundon 20.08: Ana Røssum gvidos la vesperon. Informoj sekvos.

Lundon 27.09: estos la unua junulara vespero, pri kiu respondecas Mathias Dalmose. Informoj pri la temo sekvos.

Lundon 03.09. Kvin Kopenhaganoj aŭguste partoprenos la 79-an italan Esperanto-kongreson en Mazaradelvalo en Sicilio. Eugeniusz kaj Betty rakontos montrante fotojn pri propraj spertoj.

Lundon 10.09. Jens S. Larsen zorgeme kaj kuraĝe promesis al ni, ke li penu kuraci ĉies kapdolorojn gramatikajn. Li petas, ke vi antaŭe sendu al li priskribojn pri la problemoj.

Sabaton 15.09. Kluba ekskurso al Genarp en Svedio, kie ni espere kolektos, gvidate de fungo-spertaj membroj Michæl Hansen kaj Zita Garbaraviĉienè, ungojn manĝindajn. Ni estos invitataj viziti la geedzojn Ursula kaj Tomaso Kwasniewska. Se ni sukcesos trovi fungojn, ili permesos al ni prepari ilin en sia kuirejo. Tamen bonvolu kunporti sandviĉojn kaj trinkaĵojn. Ili povos gastigi ĝis 15 vizitantojn. Bone estus, se interesatoj helpos unu la alian pri la veturado tien kaj reen. Pliaj informoj sekvos.

Lundon 17.09. Ni malstreĉe klubkunvenu babilante, kantante aŭ informante ktp.

Lundon 24.09. Junulara Vespero. Informoj sekvos.

Lundon 01.10. Ni montros la filmon 'Eduko de plurlingva infano' de Katalin Kovács. Ŝi en ĝi parolas pri la problemoj kaj rezultoj kiujn ŝi spertis edukadante plurlingvan infanon en la nederlanda socio kaj multlingva Eŭropo.

Lundon 08.10. Studvespero. En marto 2012 UEA aperigis dokumenton pri Strategia vizio por UEA:
http://www.uea.org/pdf/Strategia_vizio_por_UEA.pdf
Jen leginda kaj diskutinda plano, kiun ni povos studi kaj pripensi. Informoj sekvos.

Lundon 15.10. La arto de aŭskultado. Betty prezentos sondosierojn de Anton Obendorf kaj aliaj eminentaj parolantoj de Esperanto.

Lundon 22.10. Unuiĝintaj Nacioj. La 24-a de oktobro estas Tago de UN. Debatvespero laŭ la temo: 'Ĉu la Esperanta movado faris, faras, faros kontribuojn utilajn por la agado de UN?'
Ileana gvidos la vesperon.

Kelkaj informoj de K.E.K.

Mi komencas per trista informo pri la forpaso de nia honora membro Bodil Dora Kühlmann (10.06.1921 – 14.07.2012).

Ni estis deko da esperantistoj, kiuj partoprenis la funebraĵojn la 24-an de julio en la Preĝejo de Brønshøj. Jytte Sunekær, kiu estis multjara amikino de Bodil, verkis nekrologon, kiu ankaŭ aperas en ĉi tiu numero de Esperanto en Danio. Sincerajn kondolencojn al la familio kaj al ŝia amikaro.

Aliaj informoj estas feliĉaj.

Ni daŭre kunvenis ĉiujn lundojn. La junularaj vesperoj estas inspiraj. Inter aliaj interesaj temoj ili penis klarigi la membrojn pri poŝtelefonaj programetoj kaj la arto de tradukado. Se ni ankoraŭ ne komprenas la teknikaĵojn, la kulpo ne estas ilia.

Ankaŭ menciindas la prelegoj de Stanisław Mielczarek kaj de Amir Hadžiahmetović. Stanisław rakontis al ni pri 'Usono la lando de kontrastoj' montrante al ni sian imponan fotaron. Amir prizorgeme atentigis nin pri eventualaj katastrofoj ekonomiaj, kiam li prelegis pri 'Cifereca kaj reta

Paperaj gazeteltondaĵoj

Apr 2012: Jernbanefritid n-ro 3: Konkret resultat og reelt udbytte

Apr Radio Vatikana: Esperanto en radio

08.05. Ugebladet Næstved: Asocia registro

15.05. Dagbladet Ringsted: Det er værd at huske

30.05. Sjællandske Næstved: Krucvortenigmo

31.05. Sjællandske Næstved: Solvo de la supre menciita

Junio Sprog & Samfund n-ro 2: Sprogmelodi og esperanto (repliko al pasintnumera artikolo)

19.06. Hjemmet: Krucvortenigmo

Junio Jernbanefritid n-ro 4: Årets gang i esperantoforeningen

Ĵurnalisto de Sjællandske Næstved intervjuis unu el la membroj de la loka klubo okaze de la 125-jara jubileo de la lingvo. Tutpaĝa, pozitiva artikolo kun du fotoj aperis la 1-an de aŭgusto. La intervjuo ŝajne okazis pro elsendita gazetinformo. Ne estus malbone, se la lokaj kluboj estus informitaj samtempe.

Daŭre sendu ĉiajn menciojn pri Esperanto al Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved, kaj nun – okaze de la 125-jariĝo de Esperanto – devus aperi amaso da artikoloj.



Rimarko de la redaktoro: En julio aperis ankaŭ paĝo pri Esperanto en la revuo "Illustreret videnskab". La 26-an de julio ankaŭ aperis en Go'morgen Danmark ĉe TV2 sesminuta intervjuo kun du generacioj de denaskuloj, nome Kim kaj Villads Henriksen. Ĝi restas spektebla ĉe

<http://go.tv2.dk/morgentv/id-52111816.html>.

Næstved

Sekretario: Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved, telefono 5572 1240, rete atingebla pere de: eho-esperanto@stofanet.dk. – Kunvenoj okazas en Grønnegade 10B, konstruaĵo 10, ĉambro 111. Pri komenchoroj bonvolu vidi ĉe la koncernaj datoj.

Okazos:

Kiel nun kutime ni nun kunvenas en mardojn, kaj precipe en la post-tagmezoj. La aĝo premas la agantojn, kaj tial nia aŭtuna program estas iom magra. Tamen.

Mardon 04.09. je h 19.00: DEFA-kunveno kun faka enhavo

Mardon 25.09. je h 14.00: Studado de *Faktoj kaj Fantazioj* ĉapitro 51 +
konversacio

Mardon 09.10. je h 19.00: DEFA-kunveno kun faka enhavo

Mardon 23.10. je h 14.00: Studado de la libro H C Andersen en la Oriento
+ konversacio

Mardon 06.11. je h 19.00: DEFA-kunveno kun faka enhavo

Mardon 13.11. je h 19.00: DEFA-kunveno kun faka enhavo

Mardon 20.11. je h 14.00: Ni spektos Mardonlnovajn lumbildojn

Mardon 27.11. je h 14.00: Studado de HCA en la Oriento + konversacio

Mardon 04.12. je h 19.00: DEFA-kunveno kun faka enhavo

Mardon 11.12. je h 14.00: Jularanĝo

Okazis:

Kiel planite ni ekskursis aŭtobuse al la iama vitrofarejo *Holmegård*, kie nun estis *Holmegård Park* kun multaj eblecoj travivi multon kaj aĉeti nemultekostajn valorajn varojn. Ni sukcesis eniri la diversajn butikojn, sed parto de la travivaĵ-eblecoj ne estis ankoraŭ malfermitaj. Tamen ni travivis agrablan tagon kun abunda manĝado, kaj feliĉe, ĉar kelkajn tagojn poste la tuta aranĝo bankrotis, kaj ni ne konas la estonton pri ĝi; eble oni investis tro riske kaj optimisme.

Kiam ĉi tio estos legata, ni estos festinta nian 35-jaran datrevenon, sed pri tio ni raportos venontfoje.

Tutmondaj ekzamenoj

380 kandidatoj el 29 urboj de 17 landoj aliĝis al la Tutmonda Skriba Ekzamensesio okazonta la 9an de junio 2012 danke al Katalin Kováts, kiu, en la nomo de la Ekzamena komisiono de UEA, lanĉis kaj organizas ĝin tra la tuta mondo. La ekzameno vekis la plej grandan intereson en Francio, kie en naŭ urboj entute 125 francaj kandidatoj ekzameniĝos, sed la plej multnombra kandidataro (42) kunvenos en la Meksika urbo Tecámac. Menciindas ankaŭ la aktiva partopreno en Ruslando, kie en Moskvo kaj Jekaterinburgo entute 56 personoj partoprenis la eventon.

[La Balta Ondo]



Ankaŭ en Kopenhago okazis ekzamenoj konformaj al KER (la Komuna Eŭropa Referenc-kadro pri lingvoekzamenoj). Jen la ok ekzamenotoj antaŭ la ekzamenejo, nia kutima kunvenejo en Tomsgårdsvej.

Esperanta lu-biciklo

“Veturilo” - tiel nomiĝos sistemo de urbaj bicikloj en Varsovio. La decido estis alprenita en interreta voĉdono. La nomo en Esperanto ricevis 32 procentojn de voĉoj. Sekvis ĝin “Wawabike” kun 26 procentoj kaj la trian lokon okupis “Ziuuu” kun 12 procentoj. Sekvajn lokoj okupis “Rowe-rynka” (12 proc.), “Bajker” (11 proc.) kaj “Wabik” (6 proc.).

Post funkciigo de ĉiuj 125 luo-stacioj kun 2100 bicikloj la varsovia sistemo estos la plej granda en tiu parto de Eŭropo. Ĝia uzado estos tre simpla – necesos registriĝo kaj antaŭpago. Prezoj por uzado de bicikloj ne estos altaj kaj favoros mallongajn vojaĝojn: 20-minuta luo estos senpaga, sekvaj 40 minutoj kostos nur unu zloton. Por la dua kaj tria horo necesos pagi respektive 3 kaj 5 zlotojn. Ĉiu plia horo kostos 7 zlotojn.

LukiZ ĉe <http://pej.pl>

Android denove

Eble vi scias ke mi laboras por enmeti Esperanto-klavaron en la poŝ-telefona mastrum-sistemo Android.

La laboro prokrastiĝis, sed ŝajnas ke Guglo mem inspiriĝis kaj, kiel bela donaco, aldonis la esperantajn klavojn en la nova versio, Android 4.1 (konata per la nomo “Jelly Beans” – “ĵeleaj faboj”)!



Ĉi-maldekstre oni vidas la norman klavaron de Android, kiu havas ĉiujn esperantajn literojn. La supersignaj estas haveblaj per longa premo sur la sensupersignaj.

Jam nun oni do povas tajpi en Esperanto en Androjdo ne devante instali ion ajn!

Tamen, mi daŭrigis mian laboron fari tutesperantan klavar-programeton, ĉar ne estas konvene ke la supersignaj literoj ne estas videblaj surekrane. Tiom pli ĉar la literoj ne estas instaleblaj en pli malnovaj versioj de la telefono, kaj ne estas garantio ke aliaj parencaj sistemoj transprenos ilin.


Je la unua horo nokte la lastan tagon de julio mi finis la proponon por aparta Esperanto-klavaro por Androjdo. Se la revizantoj de Guglo akceptos la proponon ni povas, ekde la venonta versio de Androjdo (la versio post la nuna versio 4.1), havi Esperanto-klavaron en Androjdoj telefonoj sen aparta instalado de io ajn.

Laŭ propono de Aaron Irvine, la programo estas farita tiel ke ĝi entenas la literojn de ĉiuj aliaj latinliteraj lingvoj. Do, eblas, sen klavarŝanĝo, ankaŭ skribi q, w, x, y, æ, ø, å ŵ ĺ. Tiuj literoj kaŝiĝas sub la ĉefaj literoj kaj eblas skribi ilin per longa premo.

Ĉi-dekstre estas bildo de tio kio aperos, se oni longe premas “ĝ”.

Dankon al Keld Jørn Simonsen de klid.dk por disponigi servilon kie mi povis labori (mia propra ne estis sufiĉe kapabla por kompili la fontokodon de Android)

Laŭ Jacob Nordfalk en Google Plus



Trinkejo Esperanto en Aarhus



“Esperanto” estas la nomo de la vendreda trinkejo de la Instituto pri Lingvo, Literaturo kaj Kulturo ĉe la Universitato de Aarhus. Ĝi okazas ĉiun vendredon ekde la 14a ĝis 19a horo en konstruaĵo 1463, lokalo 216. Studentoj organizas ĝin, kaj oni strebas havi specialan eventon ĉiufoje, ekzemple Monty Python aŭ unufuroraĵaj muzikgrupoj.

Ĉu iu studento en Aarhus havas ideon por evento kiu ligos la nomon de la trinkejo al tiu de la lingvo? Se jes, oni kontaktu ilian respondeculon pri mendoj Steffen Kongshøj, retadreso stud20082771@hum.au.dk.

Afiŝoj

Kun granda mona helpo de la klubo en Næstved kaj donaceto de Jytte Sunekær eblis printi 1000 afiŝojn kun la 125-jara jubilea simbolo en A2-formato (42 x 60 cm). Se vi deziras ĝin, vi povas skribi al mi (kimjezus@gmail.com) kaj mi sendos ĝin al vi. La firmao Kosmorama ofertas glui ilin senpage en Kopenhago kaj en Norda Zelando. Se iu deziras ke ĝi estu gluita en aliaj urboj en Danio, kontaktu min kaj ni provos trovi solvon por tio.

Kim J. Henriksen, tel. 26 87 87 00

Premio Cigno 2012



*Etsuo Miyoshi,
fondinto de 'Cigno'*

Kun ĝojo mi sciigas, ke la Estraro de Fondaĵo Cigno decidis aljuĝi Premion 'Cigno' 2012 al Esperanto Asocio de Britio (EAB). Ilia modela informa agado instigis, interalie, la aperigon de artikoloj en gravaj ĵurnaloj kiel 'The Telegraph' kaj 'The Economist' kaj pro ilia informa kampanjo kadre de la Internacia Festivalo de Lingvoj ĉe la Universitato de Sheffield ankaŭ la vaste spektata televida programo 'BBC Matenmanĝo' atingis pli ol milionon da homoj.

La decido pri la premioto ne estis facile farebla, ĉar aliaj Landaj Asocioj kiuj partoprenis la konkurson, montris serioze bravajn klopodojn por konigi la publikon pri nia lingvo. Tio montras valoran engaĝiĝon ene de la Landaj Asocioj prioritatigi la informan agadon. Gratulon al ĉiuj!

Fondaĵo Cigno estis starigita en decembro 2011 por premii la agadon de Landa Asocio ene de la Eŭropa Unio, kiu plej bone informis la eksteran publikon pri Esperanto dum la periodo de unu jaro.

Ayako Kawakita (Prezidanto de 'Cigno')

Arto kaj komunikado



La sekva teksto estas la saluto de la prezidanto de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) al ties 45a konferenco en Kunmingo, Ĉinio, la 20-an de julio 2012:

Iom pri la historio de ILEI

ILEI naskiĝis en 1949 dum la 34a Universala Kongreso en *Bournemouth*, Britio, kun kvin fondosekcioj. La

unua konferenco supozeble okazis en 1966 – inter tiam kaj 1989 ĉiuj senescepte okazis en Eŭropo, kaj ĉiuj krom tri en ties okcidenta parto. Ekde 1990 okazis malfermiĝo, kun Havano, Kubo (1990), Kangnam, Koreio (1994) kaj Lara, Aŭstralio (1997). En la postaj dek jaroj, regis Eŭropo denove. Ekde 2007 venis la trarompo. El la ses konferencoj inter 2007 kaj 2012, kvar okazis ekstereŭrope – unu en Afriko, unu en Ameriko kaj du en Azio. ILEI nun kore bonvenigas vin al la dua el tiuj, kiu fariĝas la plej granda ekstereŭropa konferenco en la 63-jara historio de la Ligo. ILEI neniam retiros sin al siaj eŭropocentraj radikoj – ĝi regule konferencos kaj organizos aŭ subtenos kursojn kaj aranĝojn en ĉiuj kontinentoj. Ĝiaj du plej grandaj sekcioj estas la Germana kaj la Ĉina. Ĝia tutmondeco transiris de proklamo al realo.

Nome de la estraro kaj membroj de ILEI, kaj precipe la partoprenantoj, ni kore dankas al la tuta livera teamo kiu pretigis nian konferencon kaj la ligitan simpozion, kaj al ĉiuj, kiuj kontribuos al la programo. Apartan dankon ni esprimas al la Profesia Artkolegio de Kunmingo pro la gastigo kaj riĉa kulturprograma kontribuo.

De vizio al plano

Kie do troviĝas ILEI en 2012? Nia ligo povus solji je grandaj perspektivoj, sed por transsojliĝi ĝi devas superi siajn akutajn financajn kaj homfortajn limigojn. La potencialon por antaŭeniro sugestas la 16-paĝa dokumento ‘Strategia Vizio’, nun sub diskuto ene de UEA kaj de ĝia komitato en Hanojo. Tio atendeble fariĝos bazo por ‘Strategia Plano’ ne nur por UEA sed la tuta movado. Ni varme rekomendas al vi ĉiuj studi ĝin. Same kiel la ĝisnuna Plano, ĝi emfazos tri pilierojn por nia agado: **Informado**, **Instruado**, **Utiligo**. Nur ĝi asignas al ili aliajn nomojn kaj aldonas kvaran: **Konsciigo**, **Kapabligo** (tio estas ni!), **Komunumo** kaj **Kunordigo**. La vizio metas fortan fokuson sur la transforman rolon de la reto por ĉiuj el tiuj kampoj. Ĝi antaŭvidas fortan emfazon kaj rimedo-disponigon je tiuj antaŭenigaj kampoj (alivorte la plenumado de la kernaj celoj de UEA). La vizio havas pli grandajn transformigajn ŝancojn ol la antaŭa, kiu restis bele kaj noble aspira, sed ne ricevis la necesan nivelon de detaligo kaj rimedigo por multe sproni la faktan agadon. La nova dokumento starigas por ĉiu aspiro konkretajn celojn kaj projektojn, laŭ la principo SMART (la celoj

estu Specifaj, Mezureblaj, Atingeblaj, Realaj kaj Trafaj).

Kiel tiu dokumento rilatas al ILEI kaj al nia konferenco? Nu, ĝi lokas nian Ligon kerne en la kapabligaj planoj, kaj niaj lastatempaj elpaŝoj sur la kampo de instruista trejnado tre bone harmonios kun la celoj el la vizio. Ĝi antaŭvidas multe pli seriozan financadon de la edukaj laboroj ol la nuna nivelo ĉe UEA – ne multe pli ol unu milono (0.1%) de la asocia kapitalo. Kaj al nia konferenco?

La rolo de ILEI

Jen nia Konferenca temo: **La Arto de Komunikado, Komunikado de Arto**. Nu, la arton de komunikado devas majstri la esperantistoj – unue ili devas komuniki al la mondo, ke Esperanto estas aŭtentika lingvo, due ke ĝi estas lingvo kun unikaj valoroj kaj ebloj, trie, ke indas lerni ĝin.

La instrua procezo evidente inkluzivas bezonon komuniki efike kaj pozitive – nia ĉefa celo devas esti krei en lernantoj propran komunikan kapablon, kiel eble plej frue en la kursoj. Lerninte la lingvon, freŝbakitaj komunumanoj volas ekuzi ĝin iel, ĉu por vojaĝi, retbabili, trovi amikojn, movadumi aŭ per ĝi akiri sciojn aŭ kapablojn. Jam ni atingas la trian pilieron (**Utiligo** au **Komunumo**). Komunikado pri arto provizas kreivan kaj allogan manieron doni al novaj esperantistoj eblon interagi kun aliaj kun similaj interesoj kaj evoluigi sin. Efektive ‘arto’ – en plej vasta senco – estas io kiun oni nur ĝis iu grado povas teorie prezenti. La sekreto de bona instruado pri arto estas kuraĝigi lernantojn mem provi, eksperimenti, krei kaj – poste aŭ dume – pritaksi kaj diskuti la rezultojn. Oni lernas vere pri arto, ne per lekci-lavango, sed per... pentrado, kantado, aktorado, skulptado, dancado, muzikado, deklamado...

Alivorte, instrui la lingvon estas nur parto de nia misio. Ni devas samtempe konigi la uzeblojn por la lingvo, kaj ne nur la movadajn. Nia kapablo transponti kulturojn donas al ni belajn eblojn oferti valoraĵojn dum ni internaciskale... komunikas pri arto.

Mi deziras al ĉiu neforgeseblajn tagojn kaj produktivan laboron kaj partopreno en Kunmingo.

Stefan MacGill, prezidanto de ILEI



Kongreso de EEU

La 9-a kongreso Esperanto-Unio okazis en Galivo, pitoreska ĉefurbo de la okcidenta parto de Irlando. La ĉeftemo de la kongreso estis: Lingvolernado en EU: Lerni pli – kosti malpli. Dum la programo ni havis okazon pli detale konatiĝi kun la projekto Lingvolanĉilo en britaj lernejoj kiu dum la periodo 2005–2011 montris la propedeŭtikan valoron de Esperanto. Angela Tellier prelegis pri tiu temo kaj Tim Morley prelegis de la vidpunkto el la klasĉambro, montrante sian spertan manieron motivigi la lernantojn. Alia grava aliro al tiu temo estis la prelego de profesoro Wim Jansen de la Amsterdama Universitato pri “la lernebleco de Esperanto”.

Seán Ó Cuirreán, la irlanda komisiito por lingvoj konatigis nin kun la lingva problemo en Irlando, kie pli ol la duono de la loĝantaro tute ne kapablas regi sian propran irlandan lingvon, eĉ se ekzistas onidiro ke ekzistas tiom da irlandoj kiom da irlandanoj – ĉiu portas la propran lingvon en la kapo kaj en la koro. La kaŭzo de tiu lingva aspekto estas historia, ĉar dum pli ol mil jaroj la irlanda estis la lingvo de tuta Irlando, sed la malsatego de 1845-47 kiam inter 1 kaj 2 milionoj mortis pro malsato kaj la elmigrado kiu sekvis ĝin grandparte detruis la irlandlingvan komunumon. Eĉ irlandaj politikistoj konsilis al gepatroj paroli nur angle kun infanoj.

Pro tio fine de la 19a jarcento nur 3% parolis irlande hejme, kaj se Irlando ne sendependiĝus en 1922, la lando certe estus perdinta sian lingvon. Nuntempe la infanoj lernas la irlandan en la lernejoj, sed tio ŝajne ne sufiĉas por renversi la lingvan situacion. Tial la projekto Lingvolanĉilo estas tre interesa por Irlando.

Dr. Eugene McKendry, Direktoro de Norda Irlanda Lernejo de Edukado de la Universitato de Belfast, donis superrigardon de la instruado de Lingvoj

en Norda Irlando . Séan O Riain konatigis nin kun la irlanda lingvo, kiu estas kelta lingvo, parenca al la skotgaela, sed tute malsimila al la angla. Antaŭ 2000 jaroj keltoj troviĝis tra tuta Eŭropo kaj dum pli ol mil jaroj ĝi estis la lingvo de tuta Irlando, kaj unu el la unuaj literaturaj lingvoj de Eŭropo.

La irlanda vespero donis al ni la okazon ĝui la tradician muzikon kaj la ekscitajn dancojn en kiuj partoprenis ankaŭ la kongresanoj. La aliajn vesperajn kontribuojn faris la konataj esperantistaj kantistoj/aktoroj Georgo Handzlik, Saša Filipović kaj Jomo.

La venonta kongreso okazos en 2014 en Slovakio.

Ileana Schrøder

UEA ĉe UN pri indiĝenoj

Inter la 9-a kaj 13-a de julio okazis ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo la 5-a sesio de la fakula kunsido traktanta la tutmondan situacion koncerne rajtojn de indiĝenoj, “Ekspertizaj Mekanismoj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj (EMRIP)”.

Reprezentantoj de UEA Verena Graf, Cesco Reale kaj Stefano Keller partoprenis la eventon, kiun ĉeestis delegitoj de indiĝenaj popoloj el ĉiu kontinento kaj membroj de NRO-oj defendantaj indiĝenojn. La rezultoj de la EMRIP-kunsido, kiu okazas unufoje ĉiujare, estos plutraktataj de la Homrajta Konsilio de UN.

La tutsemajna sesio, kun la ĉefa temo “Lingvoj kaj kulturoj”, estis por la teamo de UEA bona okazo por krei plurajn novajn kontaktojn, ĉar praktike en ĉiu interveno estis menciita la lingva situacio de la popolo de la alparolanto. Tio ebligis alparoli la intervenintojn rekte pri la temoj de UEA: lingvaj rajtoj kaj la uzo de neŭtrala internacia komunikilo.

Stefano Keller, estrarano de UEA kaj ĉefreprezentanto en Ĝenevo, alparolis la kunsidon dum kvin minutoj. Li substrekis la malavantaĝan situacion de indiĝenaj popoloj interalie el lingva vidpunkto, kaj atentigis pri sciencaj studoj koncerne la neceson povi uzi sian gepatran lingvon, citante starpunkton de lingvistoj kaj aliaj fakuloj, kaj deklariojn kaj konvenciojn de Unesko. Li atentigis pri la rapida malriĉiĝo de la lingva kaj

kultura diversecoj en la mondo, memorigante pri la agado de UEA por defendi la lingvaj rajtojn kaj pri ĝia strebado por atingo de reciproka interkompreniĝo kaj kunlaboro inter la popoloj, per uzo de interreta, neŭtrala kaj facile lernebla lingvo Esperanto, komunikilo reale internacia.

Fine de sia alparolo Keller informis pri la projekto “Indiĝenaj Dialogoj”, kiu instruis komputil-uzadon kaj Esperanton kiel komunikilojn al reprezentantoj de indiĝenaj popoloj el 27 etnoj kun la celo ebligi al indiĝenoj el diversaj kontinentoj diskuti inter si pri la komunaj problemoj surbaze de lingva egaleco. Post lia interveno reprezentantoj de NRO-oj kaj de indiĝenaj popoloj venis al li por interŝanĝi dokumentojn kaj ekstrakti pri kunlaboro.



La salono kie kunvenis EMRIP

Partopreno en paralelaj dumtagmezaj eventoj kaj ĉirkaŭaj konversacioj ebligis al la reprezentantoj de UEA krei eĉ pli da kontaktoj. El tiuj verŝajne la plej signifaj estas la renkontoj kun partoprenintoj de la projekto “Indiĝenaj Dialogoj”, kiuj estas hodiaŭ gravaj membroj de EMRIP, kaj unu el kiuj anoncis sian deziron pri rekreo de porindiĝena projekto Esperanta kaj restas en kontakto kun UEA pri tiu eblo.

Stefano Keller

Feliĉan Naskiĝtagon!



La BMW-fabrikoj kun sia aŭtomarko MINI gratulas al Esperanto okaze de la 125-a datreveno. La brita altkvalita aŭtomobilo, kies antaŭa modelo estis produktita unuafoje en 1959, kaj Esperanto havas longan, eventoplenan historion kaj vastan popularecon tra plej diversaj kulturoj. Oni parolas Esperanton en ĉiuj kontinentoj. Internacia historio de sukcesoj – tutsimila al tiu de la aŭtomobilo MINI.

Same kiel la MINI, kiu hodiaŭ estas en pli ol 100 merkatoj en la tuta mondo, ankaŭ Esperanto evoluiĝis al internacia fenomeno, parolata en pli ol 100 landoj. La serĉilo Google, la interreta telefonservo Skype, la reta enciklopedio Wikipedia kaj la retumilo Firefox “parolas” Esperanton. Paralele al la kreskantaj postuloj de la tutmondiĝo kaj la nuntempa, moderna vivstilo Esperanto daŭre adaptas sian kreskantan vortaron al la novaj cirkonstancoj kaj defioj. Tiamaniere Esperanto samtempe signifas tradicion kaj modernigon – tutsame kiel MINI.

Pro tio MINI deziras al Esperanto “Feliĉan Naskiĝtagon!” kaj ĉion bonan por la ventontaj 125 jaroj!

[El gazetara informo de MINI]



Alvenis la granda tago – Esperanto 125-jariĝis la 16-an de julio. Ankaŭ en Kopenhago oni rimarkis tion. Sep esperantistoj el la urbo kunvenis en la domo de la prezidantino, manĝante, trinkante kaj babilante pri Galivo kaj Hanojo, pri retoj kaj aliaj fiŝkaptiloj.

